

Europejskie
Centrum
Edukacji
Międzykulturowej



Eŭropa Festivalo
de Esperantaj Kantoj
Europejski Festiwal Piosenki Esperanckiej



VROCLAVO urbo de renkontiĝoj
Honora Patronado de la Prezidanto de Vroclavo



NI KORE INVITAS PARTOPRENI EN

LA 9-A EŬROPA FESTIVALO DE ESPERANTAJ KANTOJ 2021

La festivalo estas dediĉita al infanoj, junuloj, plenkreskuloj kaj pliaĝuloj.

Ĉiu partoprenonto bonvolu alsendi vian videon kun registrita kanto en la lingvo Esperanto kun samtempa alsendo de la partituro kaj la teksto de la kanto – **ĝis la 15-a de aŭgusto** – <https://www.esperanto-festivalo-vroclavo.eu>. Tiel okazos konkursa provaŭdo de partoprenantoj. Antaŭ ĉio bonvolu sendi plenigitan aliĝilon.

Ĉi-jare, la publiko aljuĝos sian premion, la **Publik-premion**, nur al video-kantoj. La voĉdonado okazos rete **ekde la 15-a de aŭgusto**.

Ni aldonas ankaŭ novan premion – **Aŭtoran-premion**. Ĝin ricevos konkursanto, kiu prezentos plej bone propran kanton.

La Festivalo okazos en tri kategorioj:

1. koruso aŭ ensemblo, 2. solisto, 3. registrita en studio.

La premioj estos aljuĝitaj por unuaj tri lokoj. Plie estos aljuĝita **Ĉefpremio**.

La 12-an de septembro – rete okazos Koncerto de la Premiitoj kaj anonco de rezultoj.

Honoran patronecon pri la festivalo akceptis Jacek Sutryk – la Prezidanto de Vroclavo, Bohdan Aniszczyk – la Prezidanto de la Eduka kaj Junulara Komisiono ĉe la Vroclava Urba Konsilio kaj la organizaĵoj: Malsuprasilezia Fedracio de Neregistaraj Organizaĵoj (MFNO), Universala Esperanto-Asocio (UEA), Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), EUROKKA (muzika faka asocio de UEA, la kreinto de la eldonejo Vinilkosmo), “Juna Amiko” (unu el plej konataj kaj ŝatataj revuoj de Esperantujo) kaj retradio “Varsovia Vento Elsendoj”.

La organizanto estas la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado (Europejskie Centrum Edukacji Międzykulturowej).

EUROKKA fondis 3 premiojn – jarabonoj al ABONKLUBO (aliro al la kompleta katalogo de Vinikosmo, al katalogoj de 75000 aliaj sendependaj eldonejoj kun 400 000 artistoj kaj 7 milionoj da titoloj)

Ĉiaj informoj estas riceveblaj ĉe la adreso: festivalo.eo@gmail.com (skribu en la temo de la mesaĝo: E-kanto) aŭ telefone +48 692 551 131, +48 606 858 640, www.ecem.com.pl/ / <https://www.facebook.com/efekantoj/>

La organiza teamo de la
Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj